# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ EL POLA RADIO

### 3.4. NOVAJ REGULIGOJ KONCERNE USONAJN VIZOJN

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

**Taskoj:**

*1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj :*
a) en formato MP3:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr03.mp3

aŭ
b) en formato RealAudio :
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr03.rm

### Novaj reguligoj koncerne usonajn vizojn

Ekde la 1-a de aŭgusto estas malpli facile akiri usonan vizon, ĉar ekvalidis novaj reguligoj koncerne vizo-proceduon. Preskaŭ ĉiuj personoj, dezirantaj akiri la usonan vizon, devas unue persone interparoli kun la konsulo kaj respondi liajn demandojn. Kiel informis la ĝenerala konsulo de la Usona Ambasado en Varsovio Michael Kirby, la konsulo povas interesiĝi pri la kaŭzoj de la vojaĝo, pri civila stato, nombro da infanoj kaj aliaj. Pollando tuj post la unua informo pri la planoj de Usono malfaciligi vizo-procedon esprimis sian malkontenton. (2003-08-02)

**Demandoj pri la teksto**

1. Kial Usono modifis la regulojn por akiri vizon? Kial la akrigo koncernas inter alie Pollandon?
2. Ĉu la civitanoj de via lando bezonas vizon por eniri Usonon?
3. Kiam Pollando fariĝos membro de Eŭropa Unio?
4. Kial la poloj malkontentas pri la usona decido?
5. Kion vi scias pri la viza politiko de Pollando rilate al ĝiaj orientaj najbaroj?

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi nun **ne bezonas** la solvojn! Se tamen, petu ilin ĉe redaktanto@edukado.net.